

Numero de la *Revue Neuchâteloise* dediĉita al Edmond Privat
Claude Gacond, 264-a radioprelego, 1968.10.30 & 11.02

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. En septembro ni anoncis la aperon de speciala duobla numero de la revuo *Revue neuchâteloise* komplete dediĉita al Edmond Privat.

A.- Tiu okdekpaĝa kajero havas belan aspekton, kaj por la esperantistoj, kiuj kapablas legi la francan lingvon, ĝi alportas tre interesajn informojn pri la vivo kaj penso de la biografo de Zamenhof.

Cl.- Ni hodiaŭ trafolios tiun kajeron, por doni al vi ideon pri ĝia enhavo.

A.- Dum aliaj elsendoj ni eble tradukos por vi kelkajn interesajn dokumentojn.

Cl.- Foto sur la kovrilo vidigas la faman pas-permeson donita de **Gandhi** al Edmond kaj Yvonne Privat. Tiu dokumento redaktita en la angla kaj hinda estis uzata de la geedzoj Privat dum ilia veturo en Hindio en 1932.

A.- En la studoj kaj omaĝoj troviĝas kelkaj interesaj artikoloj. **Alice Rivaz**, konata verkistino, estas la filino de **Paul Golay**, kiu estis unu el la plej ŝatataj gvidantoj de la socialista partio en romanda Svislando. Ŝi memorigas, kion Edmond Privat personigis por ŝiaj familianoj, kaj precipe por ŝia patrino : socialismo vivigita de kristana spirito.

Cl.- **Charly Guyot**, profesoro pri franca literaturo en la Universitato de Neuchâtel, estis granda amiko de Edmond Privat. Li elvokas la malavarulon batalanta por paco kaj justo. Idealisto, Edmond Privat tamen bone konsciis pri la homaj malvirtoj. Lia toleremo kaj helpemo lin kondukis al la Societo de la Amikoj aŭ kvakeroj.

A.- **Fernand Donzé**, la direktoro de la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds, klarigas, ke ne estas pro hazardo, ke la libroj kaj paperoj de Edmond Privat estas konservataj en La Chaux-de-Fonds, urbo, kie Edmond Privat neniam loĝis. La donacemo de sinjorino Yvonne Privat elektis La Chaux-de-Fonds, ĉar tiu urbo ĉiam estis centro de pensado sociala, pacema kaj internacia.

Cl.- Ni poste trovas fotokopion de letero de **Tagore**, skribita en 1933 kaj donanta novaĵojn pri la hinda situacio.

A.- **Eric Descoeurdes**, ĉefredaktoro de la semajna gazeto *Coopération* kaj prezidanto de la Amikoj de Edmond Privat, raportas pri Edmond Privat ĵurnalista. La ĵurnalista agado de Edmond Privat etendiĝas de 1898 (li tiam estis 9-jara) ĝis 1962, la jaro de lia morto. Li interalie verkis por la grava pariza tagĵurnalo *Le Temps*, por la socialista gazetaro en romanda Svislando : *Le Droit du Peuple* kaj *La Sentinelle*, por kooperativaj gazetoj kaj por *L'Essor*, organo de tendenco sociala kaj religia kun spirito tolerema kaj universalema. Je la morto de Edmond Privat, unu el liaj amikoj demandis : « *Kiu nun nin informos ?* » Fakte la objektiva informado kaj la fido de Edmond Privat en la homara destino estas neanstataŭeblaj.

Cl.- **Marc Reinhardt**, profesoro pri historio en la Gimnazio de Neuchâtel, analizas la nocion utopio pere de la libro de Edmond Privat *Le Chancelier décapité, Saint Thomas More et Henri VIII* [*La senkapigita Kanceliero, Sankta Thomas More kaj Henriko la 8-a*]. La nebridebla sed ridema fido de Edmond Privat parenkas kun tiu de la granda martiro, kiu, en la epoko de la religiaj militoj, advokatis totalan pensliberecon. En sia tuta verkaro, sed precipe en *Le Choc des patriotismes* [*Interpopola konduto*] kaj *Trois expériences fédéralistes* [*Federala sperto*], Edmond Privat ĉiam unuigis la anglosaksan pragmatismon kun klara vido pri la atingenda utopia idealo : universala paco.

A.- **Petroviĉ**, la karikaturisto de Ligo de Nacioj, pentris Edmond Privat kiel prezidanton de la 17-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Ĝenevo en 1925.

Numero de la *Revue Neuchâteloise* dediĉita al Edmond Privat
Claude Gacond, 264-a radioprelego, 1968.10.30 & 11.02

Cl.- Tiun karikaturojn kaj aliajn interesajn dokumentojn eldonos iom post iom sub formo de poŝtkartoj la Centro de Dokumentado kaj Studado pri la Internacia Lingvo, kiu ĵus kreigis en la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds. Ni vin regule informos pri la apero de tiuj dokumentoj.

A.- Tiam venas artikolo de mia edzo **Claude Gacond**, kiu estas la posteulo de Edmond Privat ĉe Radio-Svislando kiel esperantista kronikisto. Li klarigas, kion Edmond Privat ŝuldas al esperanto kaj esperanto al Edmond Privat. La amiko de **Hector Hodler** estis disvastiganto de lingvo vivanta, parolata, evoluanta, kaj ne de tradukilo. Edmond Privat apartenas al la generacio, kiu ekkonsideris la lingvon internacian kiel memstaran idiomon kaj emancipiĝis de la premado de la naciaj lingvoj. Li uzis la parolatan lingvon ĝis en poezio, el tio lia stila influo. Aliflanke estas per esperanto, ke li ekrlatis kun la tuta mondo kaj fariĝis unika spertulo pri la internacia politiko.

Cl.- **Eugène Relgis**, pionira batalanto de la internaciismo, homaranismo kaj esperantismo memorigas el Montevideo, kie li nun loĝas, la fratecon, kiu lin unuigis al Edmond Privat, same kiel al **Romain Rolland** kaj **Auguste Forel**.

A.- **Pierre Hirsch**, komisiito pri serĉado por la Fondaĵo Edmond Privat, kaj ĉefredaktoro de la nun prezentata kajero, prezentas nombregajn dokumentojn, kiuj venas evidenti la amplekson kaj multflankecon de la kaŭzoj por kiuj Edmond Privat dediĉis sian vivon. La verkoj kaj la agadoj de Edmond Privat estas ilustritaj per leteroj de personecoj famiĝintaj en historio aŭ literaturo.

Cl.- Ni menciuj interalie leteron de **Ernest Naville** de 1905, kiu invitas Zamenhof veni ĉe lin en Ĝenevo post la Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Marzo ; eltiraĵojn de junaĝaj rememoroj de Edmond Privat ; multajn dokumentojn pri la agado de Edmond Privat por la sendependiĝo de Pollando : leterojn de **Sienkiewicz**, de **H. G. Wells**, de **Romain Rolland**, kaj tiel plu ; leteron de la pola historiisto **S. Askenazy** pri **Jean-Jacques Rousseau** kaj Pollando.

A.- Sekvas letero de **Edvard Beneš** de 1916 pri la lukto por la sendependiĝo de Ĉeĥoslovakio, multaj leteroj de **Romain Rolland**, inter ili unu gratulas Edmond Privat pri *Vivo de Zamenhof*. Tiu dokumento atestas, ke la franca verkisto kapablis legi, sed ne paroli la lingvon internacian.

Cl.- Fine troviĝas leteroj de **Mahatma Gandhi**, inter ili gravega teksto, kie li diferencigas la pasivan reziston de la neperforta aktiva kontraŭstaro. Okaze de la Jubileo Gandhi ni tradukos al vi tiun gravegan dokumenton.

A.- Kronologio kaj bibliografio kompletigas tiun dokumentaron, kiu donas ideon pri la riĉo de la Fondaĵo Edmond Privat.

Cl.- Tiuj, kiuj ŝatus mendi tiun kajeron, kaj kiuj ne trovis indikon en la esperanta gazetaro, povas skribi al Radio-Svislando. Ili ricevos cirkuleron, kiu donas la necesajn informojn por la mendo de tiu dokumentaro. La prezo estas 6 svisaj frankoj 50 aŭ 21 steloj. Flugfolio kun esperantaj resumoj de la artikoloj estas aldonita al tiu kajero.

A.- Tiu broŝuro donos al la neŝateloj bildon pri la vera personeco de tiu universitata profesoro, kiu de 1945 ĝis 1959 okupis la katedron pri la angla civilizo en la Universitato de Neuchâtel.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-